# La krizo de la koronviruso – alvoko por konverti sin al DIO![1]

*D-ro Lothar Gassmann, Pforzheim (Germanio)*

Jesuo Kristo ĉion-ĉi antaŭdiris: *Je la finaj tagoj venos kontaĝaj malsanoj kaj ĉiaspecaj katastrofoj*[2]. Ni vivas en la tempo, en kiu la homaro iĝas pli kaj pli sendia. Multaj pensas nur plu pri si mem kaj pri siaj kontentigoj. La malfido, la nebibliaj herezaj instruoj kaj la kontraŭkristanaj leĝoj, ĉio-ĉi aperas en kreskanta amplekso.

Multaj kristanoj jam nuntempe sin demandas: *Kiom longe Dio konfronte al tia evoluo ankoraŭ silentos?* Kiom longe Li ankoraŭ toleros blasfemadon super sia sankta nomo kaj ignoradon de siaj ordonoj?

*Ĉu nun la pacienco de Dio atingis sian finon?*

La jaro 2020 komenciĝis per grandegaj incendioj en Aŭstralio kaj la hororaj invadoj de lokustaj svarmegoj en Afriko. Tion sekvis la disvastigo de la viruso Covid-19, nomata koronviruso, en la tuta mondo.

La angoro antaŭ la disvastiĝo de tiu ĉi certe tre danĝera viruso preskaŭ tuttere kaŭzis mezurojn, kiajn oni en la tempo post la dua mondmilito ankoraŭ ne travivis, kiel: malpermeso de kunvenado, fermo de lernejoj, malpermeso eliri loĝejon, lamigo de la ekonomio.

Paralele al la malpermeso kunvenadi venis ankaŭ la malpermeso partopreni publikajn diservojn, kaj io tia okazis nek dum la milita tempo.

*Corona* – tiu ĉi vorto iĝis sinonimo por la krizo, kian ni dum nia tempo ĝis nun ne jam ĝisvivis! Samtempe tamen multaj kristanoj en tio ĉi vidas distingan voĉon de Dio en la lasta tempo, eble kiel la lastan alvokon por reveni al Dio. Ankaŭ mi la aferojn vidas tiel.

Sed jen *bona* novaĵo: *Tiu ĉi krizo povas ankaŭ fariĝi ŝanco* – nome, almenaŭ sub tri signifoj:

1. Ŝanco por nia nacio kaj por la nacioj tutmonde
2. Ŝanco por niaj familioj
3. Ŝanco por misii

## 1. Ŝanco por nia nacio kaj por la nacioj tutmonde

La Sankta Spirito parolas: *"Se Mi ŝlosos la ĉielon tiel, ke ne estos pluvo, aŭ se Mi ordonos al la lokustoj primanĝi la teron, aŭ se Mi sendos peston sur Mian popolon, sed Mia popolo, kiu portas Mian nomon, humiliĝos kaj preĝos kaj serĉos Mian vizaĝon kaj returnos sin de siaj malbonaj vojoj: tiam Mi aŭskultos el la ĉielo, kaj pardonos ilian pekon kaj resanigos ilian landon. Nun Miaj okuloj estos nefermitaj kaj Miaj oreloj estos atentaj al preĝo sur ĉi tiu loko."*[3]

---

[1] Tiu ĉi teksto estiĝis surbaze de la prediko per *livestream* 29-an de Marto 2020, kiam la pandemio de la koronviruso jam preskaŭ tutmonde lamis la publikan vivon kaj provokis gigantan ekonomian krizon.

[2] Biblio: Evangelio laŭ Luko, ĉapitro 21, versikloj 9-11: *Kaj kiam vi aŭdos pri militoj kaj tumultoj, ne teroriĝu; ĉar tio devas okazi unue, sed ne tuj estos la fino. Tiam li* diris al ili: *Leviĝos* nacio *kontraŭ nacio, kaj regno kontraŭ regno; kaj estos grandaj tertremoj, kaj en diversaj lokoj malsatoj kaj pestoj; kaj estos teruraĵoj kaj grandaj signoj en la ĉielo*.

[3] Biblio: 2 Kroniko, ĉapitro 7, versikloj 13-15.

Tion ĉi parolis Dio al reĝo Salomono proksimume en la jaro 950 antaŭ Kristo okaze de la konsekrado de la templo en Jerusalemo. Tiu ĉi Dia mesaĝo validas ankaŭ por *ĉiuj tempoj* en la historio, tiel ankaŭ por la tempo nia!

*Dio sendas siajn plagojn kiel sekecperiodon, lokustajn svarmojn kaj kontaĝmalsanojn, por ke la homoj profundiĝu en sin kaj pripensu siajn falsajn vojojn kaj returnu sin al Dio. Faru tion, poste Dio montros al vi sian gracon. Se vi tion ne faros, la juĝo Dia daŭros ĝis via plena malprospero.*

Ĉiam denove Dio sendadis profetojn, kiuj vokis la popolon de Israelo al konvertiĝo. Fine Li sendis sian Filon Jesuon Kriston, kiu donis sian vivon sur la kruco en Golgoto por pagi pro niaj pekoj.

Ĉiu, kiu revenas al Dio kaj Jesuon Kriston akceptas kiel sian savanton kaj Sinjoron en sian koron, estos savita. Kiu tamen Jesuon Kriston kaj lian savlaboron malakceptas, tiu estos pereigita poreterne.

Ankaŭ nuntempe reeĥas la alvoko konvertiĝi kun forto kaj klareco. Antaŭ nelonge mia najbaro trans la barilo, por kiu mi ne sciis, ke li havas fidon, diris: »Tion ĉi kun la kontaĝa malsano, Dio allasis, ja la homoj pri Li ne volas plu ion scii.« »Tute vere,« mi lin respondis.

Multaj homoj nun meditas pri tio, kiel rapide la alkutimigita vivo povas ŝanĝiĝi kaj kio finfine kaŝiĝas malantaŭ la krizo, kiu tiel rapide akceliĝas. Aperas komplotteorioj, kiuj eĉ povas enhavi kelkajn grejnojn da vero, sed oni ne akceptu ilin blinde – kiel oni same la oficialajn informojn per la raportoj racie rigardu kritike.

*Kiel kristanoj ni havas firman kriterion, sur kiun ni povas nin apogi – kaj tio estas la Biblio, la Dia vorto.* Legante la Biblion ni povas rekoni Jesuon Kriston kiel la vivan Dian vorton. En la Biblio ĉio, kion ni nun, en la lasta tempo, travivas, estas antaŭdirita. Kaj el la Biblio ni povas ekscii, ke venos ankoraŭ pli hororaj aferoj, kiam en la mondon venos la juĝoj de la sigeloj, tromboj, tondroj kaj kalikoj de la Dia kolero.[4]

Sed eĉ meze de tiuj lastaj juĝoj resonas la voko de Dio: *„Timu Dion, kaj donu al Li gloron, ĉar venis la horo de Lia juĝo; kaj adorkliniĝu al la Kreinto de la ĉielo kaj la tero kaj la maro kaj la fontoj akvaj!“*[5]

Ĉu la homoj en nia lando kaj en aliaj landoj de la tero tiun ĉi alvokon ankoraŭ aŭdos? Ankaŭ la politikistoj, la juĝistoj, la ekonomiistoj kaj la ĵurnalistoj, kiuj kondukis nian popolon tra la sendia politiko, kontraŭkristanaj leĝoj, ĉasado de pli kaj pli da mono kaj per la manipula raportado al la rando de abismo? Aŭ jam nun plenumiĝos la vorto el la Sankta Skribo:

*„Kaj la ceteraj homoj, kiuj ne estis mortigitaj per tiuj plagoj, ne pentis pri la faroj de siaj manoj, por ne adorkliniĝi al demonoj, kaj al la idoloj oraj kaj arĝentaj kaj kupraj kaj ŝtonaj kaj lignaj, kiuj povas nek vidi, nek aŭdi, nek marŝi; kaj ili ne pentis pri siaj mortigoj, nek pri siaj sorĉoj, nek pri sia malĉastado, nek pri siaj ŝteloj .“*[6]

Ho, ke Dio, la ETERNULO, donacu la eblecon, ke ankoraŭ multaj homoj konvertu sin al Li, la viva Dio de la Biblio, kaj akceptu Jesuon Kriston, la Filon de Dio, en sian koron!

Ho, ke Dio donacu la eblecon, ke estu abolitaj la sendiaj leĝoj, promulgitaj dum lastaj monatoj, jaroj kaj jardekoj, kiel ekzemple la preskaŭ plena liberaligo de abortado kaj helpo de propravola morto (eŭtanasio) en nia lando, tolerado de blasfemado, okultismo kaj tn. »geedziĝo por ĉiuj« senrigarde naturan sekson. Se ĉio tio estus abolita, tiam Dio por nia lando kaj popolo eventuale ankoraŭ elmontros kompaton kaj siajn juĝojn retenos!

---

[4] Biblio: Apokalipso laŭ Johano, ĉapitroj 6-19.
[5] Biblio: Apokalips, ĉapitro 14, versiklo 7.
[6] Biblio: Apokalipso 9, versikloj 20-21.

Intertempe multaj proponas novan enkondukon de la pentotago kaj preĝtago por nia lando. Al tio mi nur povas min partoprenigi. Cetere *iu ajn* tago de onia vivo estu la tago de la pento kaj de la preĝo!

Ni preparu nin persone – ĉiu por si – ke ni povu en iu ajn momento renkonti la vivan Dion; nome tiel, ke ni lasu purigi nian koron per la sango de Jesuo Kristo kaj ke ni en fido lin postsekvu.

## 2. Ŝanco por niaj familioj

La krizo pro la koronviruso prezentas ankaŭ la ŝancon por niaj familioj. Kelkaj starigos demandon: »Kial?«

Bone, en tiu ĉi momento[7], kiam mi tion ĉi skribas, la publika vivo estas preskaŭ tute lamigita. La homoj en multaj landoj ricevis de siaj registaroj ordonon eviti la eblecojn de kontaĝo kaj se iel ajn eble ne forlasi siajn loĝejojn resp. domojn. Fremdajn homojn oni rajtas renkonti nur en tre limigita ebleco kaj tiel ni troviĝas ĉefe nur ene de nia familio.

Tian situacion ni ĝis nun neniam havis! Kion do ni el tio ĉi faros?

Al mia edzino kaj al niaj jam preskaŭ plenaĝaj infanoj mi diris: »Rigardu, tio povas iĝi tre peniga afero, ke ni dum longa tempo restas sen eksteraj kontaktoj tiel dense inter ni mem. Sed tio povas ankaŭ esti ŝanco! Depende de tio, kiel ni per tio baraktos.“

Unuaj tagoj nur enkadre de propra familio, je tio ni ne alkutimiĝis jam, sed tio estis bona ekzercejo por la komuna vivo.

Kiam okaze aperis iometa »tumulto«, ni kunvokis familian konsultaron; ni preĝis kaj poste malferme priparolis ĉiujn problemojn. Ĉiu povis diri, kio indas esti plibonigata – kaj post tio *fakte* multo iĝis pli bona! Ni ne vivas pli kaj pli disiĝe inter ni, sed ni kunkreskas kiel tio por la familio decas.

Tion saman mi deziras ankaŭ por ĉiuj aliaj familioj: preĝu kune kaj parolu unu kun la alia! Pritraktu ĉiujn demandojn kaj problemojn, kiuj probable dum longa tempo estis balaitaj subtapiŝen. Nun vi havas kiel familio multan tempon por vin reciproke pli bone rekoni kaj por lerni vin reciproke ami.

Kio pri tiuj, kiuj vivas solaj, ne havante propran familion? Estus bone, se tiaj homoj konus afablajn personojn por interparoli, por esti kun ili en kontakto. Speciale en la kristanaj komunumoj! Neniu troviĝu soleca kaj forlasita.

Kaj se iu malsaniĝas, do ni prizorgos lin aŭ ŝin. Eĉ se oni la sojlon de la domo aŭ loĝejo ne rajtas transpaŝi, oni tamen povas tian aŭ alian formon de helpo, kiel nutraĵon, medikamentojn aŭ libron por firmigi la fidon, meti antaŭ la pordon. Ne forgesu, mi petas, niajn oldulojn kaj malsanulojn!

Sed antaŭ ĉio validas: Ni preĝu por ni reciproke kaj ne forlasu la diservojn, eĉ se pro la malpermeso kunvenadi ni ilin partoprenas pere de *livestream*, telefono aŭ CD. La seĝoj en la salonoj de niaj diservoj estas malplenaj, sed en Jesuo Kristo ni tamen kiel komunumo estas ligitaj inter ni.

---

[7] En Marto 2020.

## 3. Ŝanco por la kristana misiado

La krizo de la koronviruso estas ankaŭ la ŝanco por misii kaj evangelizi. Neniam la homoj estas pli apertaj por la evangelio ol dum la krizaj tempoj. Nun ni havas tian kriztempon, kian ni depost la dua mondmilito ne plu konis, kun mortangoro ĉe multaj homoj kaj kun drastaj limigoj por nia persona vivo.

Multaj homoj nun demandas sin: *Pro kio mi tute vivas, se ĉio tiel rapide kadukas? Kial Dio allasas kontaĝajn malsanojn kaj katastrofojn? Kien mi venos post mia morto?*

Publikaj misiaj eventoj kaj evangelizadoj nun pro la malpermeso kunvenadi ne plu estas eblaj. Sed kio tamen estas ebla kaj ni estas por tio taskigitaj, estas disvastigi la ĝojan mesaĝon de Jesuo Kristo ek de homo al homo. Tion oni povas aranĝi pere de telefono aŭ interreto – aŭ ankaŭ simple tiel, ke oni ĵetas bonan kristanan traktaĵon en la postkeston ĉe niaj najbaroj kaj pli larĝe.

La homoj serĉas klarigojn kaj orientiĝon – kaj kiu tion faru, se ne ni, la kristanoj?!

Ni havas ja la Biblion, en kiu oni povas trovi la informojn, gravajn por la vivo – kaj tion ni rajtas kolporti inter niaj proksimuloj.

Karaj gefratoj: *Nun bonvolu ne silenti, sed parolu! Kolportu la evangelion pri la savodona Dia amo al aliaj laŭ la maniero, nuntempe ebla.* La ETERNULO vin ĉe tio benu!

## Resumo

*La momenta koronvirusa krizo estas la ŝanco por nia popolo, por niaj familioj kaj por la misia anoncado.*

*Por nia popolo tiel, ke laŭeble multaj homoj – eĉ aparte la personoj kun pli alta respondeco – denove sin turnu al Dio, Lin petas por pardono kaj la sendiajn leĝojn ŝanĝu.*

*Por niaj familioj tiel, ke ni denove trovu proksimon unu al la alia kaj kunkresku en komunecon de amo.*

*Kaj por la misia anoncado, ne forgesante la homojn ĉirkaŭ ni, sed alparolante ilin pri la ĝoja mesaĝo, pri la savo pere de Jesuo Kristo.*

Dio vin benu kaj gardu!

*Via Lothar Gassmann*
*www.L-Gassmann.de*

## Kie mi trovas *helpon* antaŭ la timo pro la koronviruso?[8]

*Ĉi tie mi volas al vi skize klarigi, pro kio mi ne havas timon antaŭ la koronviruso kaj antaŭ aliaj kontaĝaj malsanoj, kaj kie mi spertas helpon.*

Dume mi atingis pli ol 60 jarojn da aĝo kaj tiel mi apartenas al la aparte minacata rizikogrupo, sed spite tion mi ne havas timon antaŭ la koronviruso.

„Kial ne?“ vi demandos.

Bone, certe mi obeas la ĝenerale devigajn regulojn de konduto: mi estas singarda kaj procedas kiel ĉiu racia homo por min mem kaj la aliajn protekti antaŭ la kontaĝo. Mi observas la higienajn regulojn; mi lavas miajn manojn, respektas certan distancon ktp. Tion mi nepre rekomendas ankaŭ al vi!

*Sed kio, se mi tamen iĝas infektita pere de la koronviruso?*

Tiuokaze mi scias: mia vivo troviĝas en la mano de Dio! Nek unu tagon mi mortos antaŭ ol Dio tion destinis. En la Dia mano troviĝas, ĉu mi resaniĝu aŭ ne kaj Li vokus min en la ĉielon por la eterna komuneco kun Li.

Pri la ĉielo oni povas legi en la Biblio: *„Kaj Li forviŝos ĉiun larmon en iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis.“*[9]

JESUO KRISTO, la Filo de Dio, diras: *„Tion mi parolis al vi, por ke en mi vi havu pacon. En la mondo vi havos suferadon; sed kuraĝu; mi venkis la mondon.“*[10]

Kiam mi havis aĝon de 18 jaroj, mi akceptis konscian decidon por JESUO KRISTO. Mi lin petis pardoni mian kulpon kaj miajn pekojn kaj ke li kiel la Sinjoro eniru mian vivon.

Ek de tiam JESUO KRISTO pere de la Sankta Spirito loĝas en mi kaj mi estas lia infano. Tagon post tago mi postsekvas lin kaj al li servas.

Li tenas min firme en sia mano kaj li promesis min venigi al la celo de sia ĉiela brilo, se mi restas al li fidela.

En la Biblio troviĝas skribita la certigo: *„Ĉar mi konvinkiĝis, ke nek morto, nek vivo, nek anĝeloj, nek aŭtoritatoj, nek estantaĵoj, nek estontaĵoj, nek potencoj, nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĵo povos apartigi nin de la amo de Dio, kiu estas en Kristo Jesuo, nia Sinoro.“*[11]

Same tiel neniu viruso, neniu malsano kaj morto povas nin separi de la Dia amo, se ni apartenas al JESUO KRISTO kaj lin amas!

Je tio ĉi mi min apogas. En tion ĉi mi fidas dum sanstato kaj malsano, dum la vivo kaj okaze de la morto.

*Kara leganto, kara legantino, ĉu vi havas la saman esperon? Ĉu ankaŭ vi scias, kien vi venos post la morto? Ĉu en la ĉielon aŭ en la inferon? Ĉu en la lokon de eterna ĝojo aŭ en la fajron de la eterna sufero?*

---

[8] Tiu ĉi teksto disponiĝas ankaŭ kiel senpaga faldfolio: www.lukas-schriftenmission.com

[9] Biblio: Apokalipso, ĉapitro 21, versiklo 4.

[10] Biblio: evangelio laŭ Johano, ĉapitro 16, versiklo 33.

[11] Biblio: Epistolo al RRomanoj, ĉapitro 8, versiklo 38-39.

Neniu povas esti savita el propraj fortoj kaj tiel atingi la ĉielon. La homo bezonas pardonon de siaj pekoj kaj purigon de sia koro per la Filo de Dio, JESUO KRISTO.

Kiel tio povas okazi? Jesuo ankaŭ nuntempe frapetas sur la pordon de la homaj koroj volante enpaŝi ilin. Se vi volas, tiam diru: »Jes, Sinjoro Jesuo, enpaŝu mian koron!« Konfesu al Dio viajn pekojn, vian malsukceson. Akceptu JESUON KRISTON en vian koron kaj li donacos al vi novan pensmanieron. Pere de la fido je li vi trovas veran sencon de la vivo kaj spertas sekurecon en ĉiuj vivsituacioj, ankaŭ meze de la infektmalsanoj kaj katastrofoj.

En la Biblio estas skribite: *„Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon.“*[12]

JESUON KRISTON vi povas akcepti en vian koron, se vi ekzemple sincere diras preĝon kiel tiu ĉi:

*„Kara Sinjoro JESUO KRISTO! Ĝis nun mi vivis tute sen vi. Nun mi timas kaj mi ne scias, kie mi troviĝos post mia morto. Mi vin petas: donacu al mi fidon je vi kaj amon por vi. Purigu mian koron de ĉiuj pekoj kaj malpuraĵoj. Pardonu mian kulpon. Venu pere de la Sankta Spirito en mian vivon. Donacu al mi sekurecon, ke mi sen iu ajn timo rezistu meze de la plagoj de tiu ĉi mondo kaj ke mi kun certeco sciu, ke mi post mia morto atingu vian mirindan ĉielan regnon. Kun via helpo mi volas vin dum mia tuta vivo servi. Amen.“*

Kiamaniere antaŭen:

Legu en ĉiu tago la Biblion, la vorton de Dio.

Preĝu al Dio en la nomo de JESUO KRISTO.

Serĉu por vi la komunumon, fidelan al la instruo de la Biblio, en via proksimo, kie la vorto de Dio en la Biblio estas la plej alta aŭtoritato.

Dio vin benu!

*D-ro Lothar Gassmann*
*www.L-Gassmann.de*

Elgermanigis V. O.

[12] Biblija: Evangelij po Janezu, poglavje 3, vrstica 16.